La Riverego
kebekia esperantista bulteno
Marto 2005 | Esperanto-Societo Kebekia | Jaro 20, No 79

# Toronto invitas !

Normand Fleury

La 3ª MezKanada Renkontiĝo (MEKARO) okazos en Toronto, inter sabato 21ª de majo kaj la posttagmezo de lundo 23ª de majo 2005.

Ekde sabata posttagmezo, oni venu al la festoĉambro («Party Room») de 77 Carlton Street por renkonti malnovajn geamikojn, kaj konatiĝi kun novaj.

La Toronta E-Klubo provizos per kafo, teo, kukojn kaj aliaj manĝetaĵoj. Ĉirkaŭ la 17ª horo ni kune iros manĝi en apuda vjetnama restoracio (vegetaraj pladoj haveblaj). Vi povos rigardi la menuon en la festoĉambro, antaŭ ol iri (aŭ ne iri) tien.

Dum la vespero ni povos ankoraŭ uzi la festoĉambron por ludoj (ni havas skrablon — kunportu aliajn ludojn se vi deziras), muziko / kantado, deklamado aŭ skeĉoj k.t.p. ĝis noktomezo. Se la vetero estos bona, kaj iuj preferos promeni piede, certe ili povos fari tion.

Tiuj kiuj volas povos kune matenmanĝi dimanĉe en restoracio Eggstacy, 399 Church Street (ĉe la angulo de Church kaj Carleton, okcidente de 77 Carlton je eble cent metroj). Poste, promenoj en la urbo, vizitoj al vidindaj lokoj. Detaloj ankoraŭ ne estas fiksitaj.

Kiel kutime por MEKARO, ne estos aliĝ-kotizo. Tamen helpos nin plani la renkontiĝon, se ni scias proksimume kiom da personoj ĉeestos, kaj ni do petas ke se vi intencas partopreni, sciigu nin. Tiuj kiuj vojaĝos kun grupo bonvolu mencii tion, por ke ni ne kalkulu la samajn personojn dufoje!

La kontaktadreso por sciigi pri intenco ĉeesti, aŭ por proponoj kontribui ion distran, aŭ peti informon pri io, estas: kenprice@canada.com

Mi sendos informojn en marto pri prezoj kaj adresoj de apudaj hoteloj, por tiuj kiuj bezonos trovi loĝejon.

Bonvenon en Toronton.

# Bibliothèque Solis...

Normand Fleury

La maison de l'espéranto à Montréal héberge la bibliothèque Solis qui possède une vaste collection d'ouvrages, parfois centenaires. Il est particulièrement intéressant de parcourir l'éventail de livres d'apprentissage anciens. Au fil des ans, de nombreux prêts furent effectués sans un contrôle suivi sur les retours de sorte que nous avons perdu plusieurs ouvrages. Il nous sera difficile à présent de les récupérer puisque souvent les coordonnées des gens ne sont plus valides.

Face à cette situation, le conseil d'administration de la SQE a fermé le service de prêt jusqu'à ce qu'un responsable soit trouvé. Nous remercions Zdravka Metz qui effectue présentement un travail énorme pour regrouper les livres selon diverses catégories et époques. Si vous aimeriez devenir «bibliothécaire» de la société, faites-nous signe.

# Pourquoi s'abonner au Monde de l'espéranto?

Sylvain Auclair

La société québécoise d'espéranto est une toute petite organisation, reposant sur une poignée de bénévoles. Notre bulletin, La Riverego, n'est donc qu'une modeste publication, pas une revue, et la petitesse de nos moyens comme de notre membership nous empêche d'en faire une vraie revue, qui traiterait du mouvement espérantiste dans son ensemble.

C'est pourquoi nous invitons tous nos membres à s'abonner à la revue française Le Monde de l'espéranto. Cette revue bimestrielle, principalement en français, a remplacé l'ancien Franca Esperantisto. Elle présente d'une manière vivante le mouvement espérantiste européen et mondial, bien mieux que nous pourrions le faire nous-mêmes. (Kompreneble, por havi pli rektan aliron al la tutmonda Esperanto-movado, ni invitas vin aboni ankaŭ la revuon Esperanto de la Universala Esperanto-Asocio, kaj cetere aliĝi al la asocio.)

La cotisation annuelle pour Le monde de l'espéranto peut paraître élevée, à 32 $, mais elle est plus faible que ce que les espérantistes français paient eux-mêmes!

Alors, n'hésitez plus!

# Biblioteko Solis

Normand Fleury

En Montrealo, ĉe la Esperanto-Domo troviĝas biblioteko kie kolektiĝis Esperanto-libroj donacitaj dum pluraj jardekoj. La plej malnova libro estas pli ol cent jara kaj estas interese vidi multajn malnovajn instrulibrojn. Kun la tempo, multaj libroj estis pruntitaj sen vera zorgo ĉu ili efektive revenas. Do, ni teruriĝis vidante ke efektive multaj libroj perdiĝis ĉar la pruntintoj ne plu membras en la movado kaj ni ne plu havas aktualajn informojn por kontakti ilin.

La estraro de ESK do decidis fermi la servon ĝis ni trovos respondeculon. Zdravka Metz jam komencis grandegan laboron ordigante la librojn laŭ kategorioj, epokoj, ktp sed necesos poste trovi metodon por identigi ĉiujn librojn tiel ke estos facile reordigi ilin post pruntado. Se vi pretas kunlabori anoncu


**Société québécoise d'espéranto**
**Esperanto-Societo Kebekia**

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux : Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise avec mention obligatoire de la source. Photocopié à 90 exemplaires. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto. Mise en page par Jérôme Frédéric Bouchard (jero@esperanto.qc.ca). Administrateurs de la SQE : Normand Fleury (président), Jérôme Frédéric Bouchard (vice-président), Sylvain Auclair (trésorier) et Martin Benoît (conseiller).

*La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junie, septembre kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Fotokopiita 90oble. Senpage por la membroj de la ESK. Por la aliaj, la jara abono kostas 10 kanadajn dolarojn. UEA-kodo de la Societo : kebk-d. Paĝaranĝo farita per Jérôme Frédéric Bouchard (jero@esperanto.qc.ca). Estraranoj de ESK : Normand Fleury (prezidanto), Jérôme Frédéric Bouchard (vicprezidanto), Sylvain Auclair (kasisto) kaj Martin Benoît (konsilanto).*

Échéance pour le prochain numéro / *Limdato por la venonta eldono* : 2005.05.20

6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8 • informo@esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca

# Venu al la Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto. (ARE) en Silvero, NovJorkio.

Normand Fleury

Eble vi pensos ke estas iom frue por paroli pri renkontiĝo kiu okazos nur en oktobro! Nu, vi komprenu ke ni devas mendi lokon en Silvero (Silver Bay, Lake George, NY) jam printempe por esti certa ke ni havos lokon por 50 personoj. Mi do petas ke vi rapide respondu al la subaj demandoj

*Mi volas mendi en Silvero (prezoj en USD + 5% imposto):*

**1-Gastejo The Inn (inkluzivas 3 manĝojn, litaĵojn):**
❒ unu/du-lita ĉambro kun privata banejo: po 97$ persone/tage
❒ duobla-lita ĉambro kun privata banejo: po 97$ persone/tage
❒ unu/du-lita ĉambro komuna banejo: po 83$ persone/tage: jes/ne
❒ Junuloj ĝuas rabaton de 20%
❒ Mi estas vegetarano
❒ Mi estas vegano
Notu ke por la infanoj sub 4 jaroj estas senpage; 4-12 duonpreze.

**2-Gastigado en 19 persona dometo, Hillcrest (sen manĝoj):**
❒ lito en plur-persona ĉambro, po 40$ persone/semajnfine
❒ faldo-lito (nur 3 haveblaj), po 20$ persone/semajnfine
❒ manĝokupono matenmanĝo: po 6$. Kiom da?_______________
❒ manĝokupono tagmanĝo: po 8$. Kiom da?_________________
❒ manĝokupono vespermanĝo: po 12$. Kiom da?_____________
❒ Mi estas vegetarano
❒ Mi estas vegano

**3-Gastigado en aliaj dometoj.**
Estas pli ol 20 dometoj en Silvero. Prezo varias laŭ kiom da personoj povas loĝi ene. Grupiĝu kaj petu detalojn sed necesas mendi rapide jam printempe.

**4- Grave**
❒ Por teo aŭ kafo, 2$ tage/persone. Kiom da? ________________

---

Tiuj kiuj loĝas en The Inn ne bezonas pagi aparte por la manĝoj. Mi rekomendas al la Hillcrest-anoj aĉeti almenaŭ la kuponon por la dimanĉa vespermanĝo. Ne okazos komuna bufedo kiel en Okemo. Ne estas vendejo aŭ restoracio apud Silvero, necesas veturi al la urbo.

Fine, la kostoj inkluzivas la kunvenejoj. La kotizo falos de 25$ al 5$ (por ĉiuj) Donacoj estas bonvenaj por helpi subvencii alvenon de junuloj/studentoj. Kotizo pagebla surloke.

Esperante ke la informoj klaras. Ili aperos ĉe la retejo post iom da tempo: www.esperanto.qc.ca.
Sendu vian mendon al: informo@esperanto.qc.ca

# Club d'espéranto à l'Université de Montréal

Jérôme F. Bouchard

L'Université de Montréal a maintenant son club d'espéranto. En effet, la demande déposée par une dizaine d'étudiants de l'UdeM en vue d'une reconnaissance par la Fédération des associations étudiantes du campus de l'Université de Montréal (FAECUM) a été acceptée tout récemment.

L'UdeM, tout comme les autres universités montréalaises, regroupe tant des étudiants et des chercheurs québécois que des gens provenant de l'étranger ou des membres des minorités ethniques québécoises. Cette situation, souhaitons-le, facilitera la reconnaissance de l'espéranto comme moyen de communication entre les différents groupes universitaires. C'est donc sous l'axe de la multiculturalité que les membres du club souhaitent défendre leur langue. D'ailleurs, ce groupe compte déjà dans ses rangs, en plus des Québécois, quelques étudiants étrangers.

À court terme, le club entend faire la promotion de la langue internationale par le biais de campagnes d'affichage et de conférences. Un cours pourrait être organisé dès la session d'été ou la rentrée en septembre. Par la suite, le club souhaite promouvoir la langue par la rédaction de lexiques adaptés à chaque champ d'étude et par l'organisation d'activités d'intégration pour les étudiants étrangers.

Il est probable que parmi les nombreuses personnes qui visitent l'Université de Montréal il y ait quelques espérantophones. Les membres du club souhaitent les retrouver et faire la démonstration du potentiel de l'espéranto comme langue-pont.

Vous êtes étudiants à l'Université de Montréal ou vous souhaitez donner un coup de pouce en élaborant un lexique adapté à votre profession? Vous connaissez des étudiants étrangers espérantophones ou intéressés par l'espéranto? Vous souhaitez apprendre cette langue à l'Université de Montréal? Écrivez au responsable du club à udem@esperanto.qc.ca.

# En avant l'utopie!

Jérôme F. Bouchard

Les Nations unies, le canal de Panama ou les systèmes de Métro voilà ce qui à une autre époque était des utopies. Nous sommes aussi ces idéalistes un peu fous lorsque nous proposons au monde notre utopie : une langue pour l'humanité. Pour concrétiser ce rêve, les espérantistes ont misé sur différentes approches. Après s'être investis à rédiger grammaires, méthodes et dictionnaires, les pionniers de la langue universelle ont voulu aller plus loin et la doter d'une culture propre. Ainsi, au fil des époques, des associations sont nées, des journaux et des livres ont été édités, des pièces de théatre et des oeuvres musicales ont été interprétées. Plus récemment, apparaissaient sur internet les groupes de discussion ou les chaînes de radio. Voulant aller plus loin, quelques-un proposent aujourd'hui de créer une télévision espérantiste sur internet.

***... en faire le premier pays officiellement espérantophone...***

Au milieu des années 1990, la SQE organisait des fins de semaine espérantistes sur le bord du lac Magog. Je me souviens avoir entendu, Normand Fleury rêver à haute voix. Il m'avait dit alors qu'il aimerait acheter l'île en face de l'endroit où nous étions pour en faire le premier pays officiellement espérantophone; «la unua esperantujo».

*(suite plus loin dans ce numéro...)*

# Mi rekomendas ĉe la reto...

Normand Fleury

Kiel zorganto de la retadreso de ESK, mi ricevas multajn retmesaĝojn pri petoj sed ankaŭ pri novaj interesaj retejoj. Jen mi vizitis la subajn retejojn kaj rekomendas ilin al vi. Vi povos malkovri ke la mondo de Esperanto estas pli kaj pli vasta, interesa kaj diversa. Bonan retumadon.

**Korea paca retgazeto.**
http://solidareco.cafe24.com/index.php

**Kompleta retejo pri Dachau kie mortis miloj da homoj fare de nazioj.**
*Vere profesia retejo.*
http://www.foessmeier.name/tradukoj/kzg-dachau/

**Libera folio, sendependa movada bulteno prezentas artikolon pri nazia koncentrejo.**
http://www.liberafolio.org/persone/petrginz

**Eĉ se vi ne kolektas Esperanto-bildkartojn, tamen tiu retejo certe mirigos vin ĉar ĝi prezentas ampleksan kolektaron da tiaj kartoj.**
http://www.eventoj.hu/bildkartoj/index.htm

**Kino kaj esperanto.**
*Por scii pri historio : tra la jaroj, kiun lokon prenis Esperanto en la kinarto ĝenerale? Originaloj: ĉu ekzistas filmoj originale verkitaj en (aŭ dublitaj al) Esperanto? Esperantaĵoj: kiel Esperanto aperas en alilingvaj filmoj? Subtitoloj : kiujn filmojn oni subtitoligis en Esperanton? Teĥniko: kiel havigi al si filmojn subtitoligitajn en Esperanton? Informo : kiel trovi pliajn informojn pri tiu temo (ret-ligiloj,...)?*
http://www.ifrance.com/senlime/kino/kino.htm

**Fine por ekscii pri Esperanto en la Amerikaj landoj.**
http://geocities.yahoo.com.br/esperantobrazilo/

# En avant l'utopie! (suite...)

Jérôme F. Bouchard

*(...suite)* Je vous propose maintenant de faire de même; jouons à ce jeu et imaginons, à notre échelle, nos utopies espérantistes québécoises. Quels rêves à mi-chemin entre l'utopie et la réalité pouvons nous avoir?

Voici quelques propositions... Pourquoi ne pas profiter du potentiel international de l'espéranto pour créer une école alternative internationale? Montréal a déjà son village gai et son quartier chinois, qu'attendons-nous pour nous regrouper et créer un quartier espérantophone? Ne serait-ce pas une belle chose que d'offrir aux enfants de la planète un camp de vacances espérantiste? La république espérantiste, est-ce un rêve si fou quand on pense à Sealand, Hutt River ou au Royaume de l'Anse St-Jean?

C'est maintenant à votre tour de proposer l'impossible. Partagez avec nous vos rêves en envoyant un message à jero@esperanto.qc.ca. Nous publierons dans la prochaine Riverego une compilation des suggestions les plus osées.

# Montrealaj Esperanto-kunvenoj (MEK)

| DATO | KIE | HORO | TEMO |
|---|---|---|---|
| 2005.03.14-lun. | Commensal * | 18h | Babila vespero |
| 2005.03.25-ven. | MEDO ** | 20h | Muziko |
| 2005.04.9-sab. | MEDO ** | 19:30h | Filma vespero |
| 2005.04.11-lun. | Commensal * | 18h | Babila vespero |
| 2005.04.29-ven. | MEDO ** | 20h | Literaturo (mia plej ŝatata libro) |
| 2005.05.9-lun. | Commensal * | 18h | Babila vespero |
| 2005.05.21-22-23 | Toronto | | MezKanada Renkontiĝo (MEKARO) |
| 2005.05.27-ven. | MEDO ** | 20h | Mia profesio, okupo... |
| 2005.06.13-lun. | Commensal * | 18 h | Babila vespero |
| 2005.06.17-ven. | MEDO ** | 20h | Komputiloj, linukso, skajpo... (Lasta vendredo estas 24ª de junio!) |
| 2005.09.12-lun. | Commensal * | 18h | Babila vespero |
| 2005.09.30-ven. | MEDO ** | 20h | Temo decidota |
| 2005.10.8-9-10 | NovJorkio, Usono | | 12a Aŭtuna Renkontiĝo (ARE) |
| 2005.10.28-ven. | MEDO ** | 20h | Temo decidota |
| 2005.11.12-sab. | MEDO ** | 19 h 30 | Filma vespero |
| 2005.11.25-ven. | MEDO ** | 20h | Temo decidota |
| 2005.12.17-sab. | Botanika Ĝardeno † | 18h | Decembra festo kaj komuna bufedo |

*** Commensal :** 1720, rue Saint-Denis, 845-2627, métro Berri-UQAM

18h *Libervola alveno por manĝo.*
Souper libre

19h *Amika babilado sen fiksita temo.*
Discussion amicale sans thématique

**** Montreala Esperanto-Domo (MEDO):** 6358-A rue de Bordeaux, Montréal
Entre Papineau et De Lorimier.
Métro Beaubien, Autobus 18 Beaubien Est
Voir le site web pour un plan d'accès : www.esperanto.qc.ca

19 h *Horo por komencantoj, lernado, konversacio, demandoj pri la movado.*
Heure pour les débutants : conversation, questions, grammaire...

20 h *Anoncoj, libera babilado, libro pruntado aŭ aĉetado, aliĝo al ESK.*
Annonces, emprunt ou achat de livres, de revues, adhésion à la SQE.

20 h 30 *Tema programo, diskuto, kvizo, ludo...*
Programme thématique, discussion, quizz, jeux...

**† Botanika Ĝardeno (Jardin Botanique) :** 4101, rue Sherbrooke Est, Montréal
Métro Pie-IX, stationnement gratuit
ENTREZ PAR LES SERRES, derrière le bâtiment administratif.

**Por komentoj, proponoj, demandoj : informo@esperanto.qc.ca**